

PRO ŠIAJ BELAJ OKULOJ

Higinio García

Publikigita en *Mondo*, Eldonejo Kleks, Bielsko-Biała 2001

1.

*Verdaj okuloj perfidas,
bluaj okuloj mensogas:
nigraj kaj kaŝtankoloraj
firmaj estas kaj verdiraj.*

«Oni kalkulas la Indekson de Konkurenco, IK, laŭ du bazaj elementoj: la Indekso de Relativaj Prezoj, IRP, kaj la Ekvilibrita Indekso de l' Monunuo (ĉe ni, la kredito), IEM».

Li legis demandon en ŝiaj okuloj. Nur en ŝiaj okuloj. De la aliaj, la plejparto rigardis lin mortfiŝe, kaj la jesuloj kiuj esperis iam onte fariĝi «Ĉeooj», Ĉefaj Ekzekutivaj Oficistoj, pie notis en siaj komputiloj «la monunuo, ĉe ni; la kredito, jen» —aŭ kion, Riĉdona Lakŝmia, kion ili notis?—.

«Jes», li respondis al la silenta demando de la radiaj migdalokuloj, «per la IRP, kiel la nomo mem jam komprenigas, oni kalkulas la evoluadon de l' kostoj laŭ la elcentoj de la inflacio. Se oni dividas la Indekson de l' Prezoj de Konsumvaroj, IPK, ekzemple, ĉe Uzinurbo, per la averaĝo de tiu indekso ĉe, ni diru, dek ses aliaj konkuraj landoj, oni havas la IRPon ĉe Uzinurbo».

Je la malkovro de tiu profunda vero, ŝi tiel ĉarme palpebrumis, ke ŝiaj pupiloj sparketis kiel neĝeroj sub la suno.

La profesoro sciis ke la posedantino de tiuj elektrigaj kaŝtankoloraj okuloj religie aŭskultis lin, ĉar li sciis ke ŝi sciis ke li trovis ŝin bela. Kaj, ĉar ŝi sciis ke li trovis ŝin bela, ŝi trovis lin inteligenta. Kaj, ĉar ŝi trovis lin inteligenta, ŝi trovis lin interesa. Kaj, ĉar ŝi trovis lin interesa, li estis interesa kaj interesigis kelkajn aliajn en la klaso, kiuj ekaŭskultis. Almanaŭ tiuj, kiuj ne estis elbrutigitaj de la decibeloj kaj la mallumo de la Studenta Diskoteko. Do, jen la miraklo: li kontraŭstaris la «fenomenon akvarion», tiun nervozigan impreson bone konatan de ĉiu instruisto, ke oni parolas

al fiŝoj trans vitra muro. La rigardo de la belulino, transirante la muron de la akvario, frakasis ĝin.

«Fakte, ĉu iu en la klaso memoras tion, kio estas la Indekso de Prezroj de Konsumvaroj?», li demandis al ŝi. Nun, la efekto akvario reaperis: paroj da bluaj globoj, rifuĝantaj sub la vizieroj de siaj kaskedoj, gapis al la nevidebla septo kiu protektis ilin kontraŭ la agresoj de la scienco.

Sed tio jam ne gravis. Ĉar, kun la modesteco de sia memfido, la ĉarmulino levis la manon.

Kiam sparko el ŝia rigardo ĵus ekflamigis la koron de la profesoro, ĝuste tiumomente, iu frapetis al li la ŝultron.

«Pardonu, sed mi kredas ke ĉi tiu ne estas via klaso».

Li eksaltis. Konfuzite, li rigardis sian tempotabelon. Jes, li estis intermiksinta la numerojn de la klasĉambroj.

«Ĉiam tiel distriĝema, kiel vera klerulo!», ŝercis la alia profesoro. «Mi kredis ke vi devis anonci ion urĝan, kaj mi atendis, sed...»

Li balbutis ekskuzon kaj eliris.

Fakte, li ne estis intermiksinta la numerojn de la klasĉambroj. Li estis pasinta tra la koridoro survoje al sia klaso, kiam li vidis tiujn okulojn. Ili lin altiris, hipnotizis kaj forgesigis kie li estis, kien li iris, kaj ĉion, kio ne estis ili kaj ilia proprietulino.

2.

*Kiom da sensoj ni havas
ĉiuj kvin estas bezono:
kaj l' tutan kvinon ni perdas
kiam trafas nin la amo.*

Estis la Tago de Inicado, kaj la duajaraj studentoj ĉas-sekvis la unuajarulojn por trudi al ili tiujn humiligojn per kiuj la turmentistoj ekzercas sian humorsenson kaj la viktimoj

sian obeemon, atendente la venontan jaron por sin venĝi kontraŭ la novaj flavbekuloj, kiuj atendos...

La profesoro, laŭeble, evitis renkonti la procesiojn de inicantoj kaj inicatoj. Sed, en la koridoro, li devis trapasi gregon da kaskeduloj kiu ŝtopis la aliron al lia klaso. Oni dirus ke la Studenta Diskoteko estis vominta sian tutan enhavon da junaj fuŝaĵoj.

Malgraŭ sia forpuŝo, li sin mergis en la homkaĉon, antaŭenpuŝante sin per la ŝultroj kaj la kubutoj.

Kiam li malmergiĝis, li sin trovis kontraŭ ŝiaj okuloj.

Ho, kiom ili estis belaj! Ili fajreris pro fiero, pro kolerero, pro rabio. Tiel ke, per sia rigardo, ŝi dummomente estis haltiganta la hordon da ridaĉantaj brutoj.

La plej malnobla el la brutoj blekis al ŝi:

«Demetu do vian robon, ek!».

Alia montris al ŝi botelon de razoŝaŭmo:

«Ne timu pro via pudoro, princino! Oni kovros vian nudon!»

«Kaj rigardu do la belan juvelon! Kiu ĝin surhavas, la mirindan medalionon?» La medaliono kiun klaŭna molaĉulino montris al ŝi estis kondomo plena je ovoblanko, pendita de ŝnuro.

Ŝi kunstreĉiĝis, preta elsalti por mordi kaj ungoskrapi.

La profesoro lokis sin inter la belulino kaj la brutaro, kaj siblis al la gvidanto:

«Lasu ŝin trankvila».

«Ej, prof'o! Estas Inicado, ĉu vi kaptas? Iru do al via klaso, kaj rigardu ĉu ni tie estas!»

«Vi iru, al viaj klasoj, mi diras!»

«Senkulpigu min, s'jor' prof'o», rikanis la bruto, dum li flankenpuŝis la profesoron per sia giganta antaŭbrako.

La profesoro prenis la bruton je la kolo de la ĉemizo; la bruto levis la profesoron je la refaldoj de la jako; la profesoro, celante sin liberigi, faligis la kaskedon de la bruto.

Tio estis neimagebla insulto. La estingitaj okuloj de la bruto ekflamiĝis ruĝaj...

Antaŭ la lasta frapo, kiam pugno falis sur lian kranion kiel martelo sur amboson, la profesoro povis vidi ke la belulino, profitante de la stuporo kaŭzita de la profanado de la gvida kaskedo, katmove sin ŝovis trans la bestaron kaj malaperis.

Li svenis, kaj oni portis lin al la flegejo.

3.

*Ĉe l' bordo de l' mar',
ĉi estas barketo
por la navigad'
ĉe l' bordo de l' mar'. (1)*

Li kuŝas sur sia lito, duonmorta, duonviva, duonreva, duonpensa.

La liton levas kaj mallevas ondoj de vizkoza ĵeleo, kiuj modlas ĉiuspecajn monstraĵojn kaj rompiĝas en miloj da okulŝajnaj bobeloj.

Unu okulo saltas supren, eksenmove, malsupren, enmane de Lia Doktora Moŝto la Direktoro: «Konsentite, nuntempe vi estas malfacile anstataŭebla, ĉar maloftas kandidatoj por labori en instruado. Tamen, vi nepre devas lerni ĝis kie vi povas troiri: certe, ne ĝis profanado de l' kaskedo de l' kapulo de nia rugbeteamo...» Kaj li pli kaj pli nerveze saltigadas sian nedisigeblan vitran buleton: supren, eksenmove, malsupren, enmane. Fine, la moŝto tiel ŝvelas pro kolero, ke la ĵelea veziko kiu formas lin krevas, kaj malaperas en la ondoj.

La lito leviĝas kaj malleviĝas inter mortfiŝaj okuloj de studentoj, evitemaj okuloj de kolegoj... kaj nun, du kompatemaj verdaj okuloj sin fiksas al modlaĵo de lia eksino, kiu obstine

restas lia plej bona amiko: «Mi komprenas kaj respektas viajn ideojn (mi ĉiam tion faris), eĉ pri Inicado. Vi estas ankoraŭ tiel viaspeca kiel antaŭe... Sed tamen, kial tiom severe preni junulan amuzon? Kaj, ĉu vi volas ke mi diru al vi?» Li ne volas, sed, pro alkutimiĝo, ne malfermas la buŝon. «Inicado estas eduka agado, kiu lude sociigas la gelernantojn, eĉ vian belan sovaĝan katineton, se ŝi ne estus tiel sekse subpremita... (parenteze, neniu plu revidis ŝin). Sed, por kio mi tion diras al vi! Mi bone scias ke mi ne konvinkos vin. Evidentas ke, por vi, estas neceso ĉiam pravi: la tuta homaro eraras, vi sola posedas la veron. Tio estis la kaŭzo, ke mi forlasis vin. Sed, kial vi rigardas min tiamaniere? Ĉu mi ankoraŭfoje diris ion, kion mi ne devis diri? Tamen, kiel ĉiam, mi nur volis helpi vin...» Koncentrante sian tutan menskapablon, li dismiksas ŝin en la ĵeleon.

Pluaj ondoj. Supre, en la ĉielo, du grandaj kaŝtanbrunaj okuloj rigardas lin.

Denove la doloro, aliaj okuloj. Du el ili rifuĝas malantaŭ la palpebroj de la Prezidanto de la Sindikato, duonfermitaj pro sendormo kaj laciĝo: «Bone, nenio rompita, vi estas bonŝanca. Kiamaniere metiĝis en vian kapon tiu ideo tuŝi kaskedon de studento? Ĉu vi scias ke la Studenta Asocio volis persekuti vin pro publika humiligo de lernanto? Certe, la Sindikato de Profesoroj kontestus, ĉar vi pretekstas ke via ago estis neintenca. Via ago estis neintenca. Ĉu! Kaj kial vi tiom alproksimiĝis, ke vi eniris la personansferon de l' studento? Kaj kial vi intermiksiĝis en internan studentan aferon? Ĉu vi volis estigi novan eksplodon de violento? Nuntempe, de kiam la Direktoro permesis ke ili portu siajn cerbomuzikilojn dum la lecionoj, ili sin tenas trankvile. Nu, se ni kontestus ilian plendon, certe unu aŭ du junuloj ne kredus plu je justeco nek je sociaj valoroj nek je futuro, alprenus sian armilaron kaj masakrus ĉion ĉirkaŭe; evidente, tri aŭ kvar profesoroj perdus sian fervoron kaj sinmortigus, kaj sur la ceterajn falus epidemio de deprimado. Ĉu estas tio, kion vi celis? Dek naŭ sinsekvajn horojn da negocado

por fari aranĝon kun la studentoj kaj la Direktoro! Ĉu vi konscias?» Bonŝance, la brunaj okuloj, de la ĉielo, malaperigas la Prezidanton.

Li sufokiĝas.

Heroece, li decidas sin levi por malfermi la fenestron kaj spiri iom da aero. Aŭ pli bone, la riĉan ĥemian miksaĵon kiu funkcias kiel aero en la Urbo. Solviĝas tiom da kombinaĵoj en tiu vaporo, ke estus miraklo se ĝi ne enhavus kelkajn molekulojn sanigajn, aŭ almenaŭ analgesikajn.

La brunaj okuloj kiuj, dum lia koŝmaro, rigardis lin de la ĉielo, rigardas lin trans la fenestro. Tio ne tro maltrankviligas lin: la vundo en lia koro, aŭ la frapoj sur la kapo, pli eble.

Kiel li povas, li iras ĝis la fenestro kaj ĝin malfermas.

Tie, kvarpiede, estas la favorata per la mirindaj brunaj okuloj: blanka katino, kiu, el la sojlo, trapasas al la breto. Ŝi miaŭas kaj ronronas al li.

Li premas ŝin kontraŭ sia brusto, kaj reiras al la lito. La katino katinece alprimiĝas al li, karesante lian vangon per sia orelo. Li enigas la fingrojn en la sekan, puran kaj varmetan felon de sia amikino, kaj la malvarmaj viskozaĵoj algluitaj en sia animo de la kontakto kun la hierarkio, la jesularo kaj la hundecaj homoj varmiĝas, sekiĝas kaj malaperas.

Ŝi ronronas. Li ensilentas. Ili flosas sur kvieta dormo, sen doloro, revo kaj koŝmaro.

(1) Popola kanzono galega.